



Esperanta Vorto

Oběžník kroužku esperantistů
při Újezdní osvětové besedě
v Lanškrouně

11

Cirkulero de Esperanto-Rondeto
ĉe Distrikta kleriga kunularo
en Lanškroun - ĈSR

=====APRILLO 1952 / 2-a j. /=====

JAN AMOS KOMENSKÝ / 28.3.1592 – 15.11.1670 /

Li estis la lasta episkopo de la Ĉeĥaj Fratoj. Lia celo estis jam moderna celo: idealo materia kaj idealo klerika. La bezono agi kaj la ĝuo mediti estis ĉe li en la harmonia konsento. Li estis efektive kredanta membro de la eklezio de Ĉeĥaj Fratoj, li kondamnis militon, sed ankaŭ bone sciis, ke lia propra nacio devas esti libera por plenumi taskojn donatajn de Dio, kaj ke por interfratigado de nacioj estas necese krei novan artefaritan helplingvon. Pri tio skribis en la verko „Via lucis“ kaj eble li mem proponis iun komunan lingvon. Jan Amos Komenský estas instruisto de nacioj, fondinto de la novepoka instruado, grava filozofo de 17-a jarcento.



Ni vivas en 20-a jarcento. Metodo de la instruado tre progresis kaj ankaŭ ideo de internacia lingvo reaperis. Ni estas sufiĉe fortaj kaj nia tasko estas disvastigi Esperanton kaj plenumi tion, kio jam antaŭ longe deziri Komenský.

Z.Polák

ESPERANTISTO SUR KOREA BATALKAMPO

En gazeto „El popola Ĉinio estas interesa artikolo. Al redakcio de gazeto skribis juna korea Esperantisto rekte el korea fronto. Ĉi vii junulo, kiu batalas por la sankta libereco de sia patrio, deziras korespondi kun iu ĉina Esperantisto. Li scias, kiel granda estas la helpo de ĉinaj volontuloj al korea popolo. Li estas feliĉa, ke konas Esperanton, kaj povas danki al ĉinaj helpantoj. Li finas kun saluto: „Vivu la solidareco inter Ĉinio kaj Koreio! Frate via Cung Zunghau“.



PROKSIMIGAS LA 1-A DE MAJO, TUTMONDA FESTO DE LABORO. En Ĉeĥoslovakio ĉiuj homoj, laboristoj en fabrikoj, terkulturistoj sur kampoj, ĉij ceteraj laborantoj kaj junularo preparas sin por gloran 1-an majon, laboras por honoro de tiu ĉi tago. Ankaŭ ni, Esperantistoj, festu nian sukcesan laboron!

E.J. raportas

DOLNÍ ČERMNÁ – Meze de marto finiĝis ambaŭ kursoj. La rezulto estas tre kontentiga kaj ni tuj povis efektiviĝi tion, al kio ni dekomence celis – fondi propran klubon kaj aliĝi al nia progre santa Junularo-Movado. Do, nun tiel okazis, sed nesolvita restas ankoraŭ la problemo. Kie ni kunvenu. Konvenan ejon ni jam trovis kaj ĉiuj estas komplezaj partopreni brigadojn por plibonigi ĝian aspekton. Sed – ho ve – neatendita baro! Kleriga kunularo en Čermná evidente ne komprenas, ke ankaŭ Esperanto batalas porpaco kaj nian klopodon malhelpas. Sed venko estos nia!

Dume ni kunvenas en ĝisnuna kursejo kaj ni volas, ke ĉiuj, el vidpunkto lingva, farigu bonaj Esperantistoj. Antaŭ ĉio ni bezonas adresojn de eksterlandaj amikoj. Ĉiuj korespondataĵoj bnvolu sendi je adreso: Esperantisto-Klubo, Dolní Čermná 221, okr. Lanškroun.

- 2 -



HEŘMANŮV MĚSTEC – Nyní děláme stále nábor na středních školách, dívčí a chlapecké a ve veřejnosti pomocí výkladních skříní. Propagační materiál vypůjčený z Lanškrouna jsme instalovali ve středních školách.

LANŠKROUN – Post junulara konferenco en Pardubice la verda vivo de niaj membroj tra plialtiĝis. Kolektiva animo kaj verda amikeco enfluis en arteriojn kaj vejnojn de niaj gesamideanj kaj ĉiu volis esti al klubo iel utila.



Ankaŭ programoj de niaj junularaj kunvenoj tre verdiĝis. Nun ĝi konsistas el:

1. Rakontado de pliaĝaj samideaninoj pri fremdaj landoj, kiujn travojaĝis.
2. Rakontado de antaŭpasinta artikolo.
3. Gramatiko.
4. Traduko de 10 frazoj en Esperanton el pasinta artikolo.
5. Klarigo de nova artikolo.
6. Organizaj aferoj kaj anonco de poentoj.
7. Lernado de nova Esperanta kanto – kantado.
8. Danco laŭ gramofono aŭ laŭ ĥromatika harmoniko.

Krom tio unu delegito al nia klubo partoprenis unu parton de seminario en Olomouc.

VÝPRAČTICE – Ve Výprachticích je v Junularu 10 členů. Je to skupinka začátečnická, ale snaživá, její mladé ratolesti se na pondělních schůzkách v klubovně ČSM učí i baví opravdu s upřímným zájmem za vedení obětavé, delegátky Evženky. Neustaňte v práci! Vaše schůzka, již jsem se zúčastnil, mě potěšila.

J.W.

Nová delegátka: Evža Blažková, Výprachtice 117, okr. Lanškroun.

RYCHNOV NAD KNĚŽNOU – Zde Junularo připravuje besídku. Bližší bude na pozvánkách.

KUNVENAJ PROGRAMEROJ:

Ellerno de la kanto „La fluanta tajdo“
Legado de novaĵoj el „Esperanta Vorto“
Esperanta gramatiko – akuzativo – 8-a pĝ.
Societa ludo „Al kio ĝi similas?“

ATENTIGO: En la 10-a numero de EV, sur 5-a paĝo ni publikigis en raporto de regiona konferenco sciigon de s-ano Fr.Svačina pri somera kursaro en Otrokovice. Bonvolu konscii, ke tiu sciigo estas erara.

Red.

Ludo : Al kio ĝi similas ?

Ellotita ludanto eliros el la klubejo kaj la ceteraj interkonsente elektos iun objekton, kiun ellotita ludanto reveninte devas diveni. Sed li povas demandi nur ti elmaniere: „Al kio ĝi similas?“ - Respondantaj ludantoj memkompreneble devas lerte respondi, por ke baldaŭ la objekton ne vidigu. Kiu perfidos, iras el la klubejo kaj divenas.

Ekz.: Elektita objekto estas broso / kartáč /. Eblaj respondoj: Ĝi similas al Zdeněk, ĉar li ankaŭ ne razas sin. - Ĝi similas al balailo, ĉar estas ankaŭ parte ligna . . .



KONSILO AL ĈIUJ RONDETOJ

Multaj rondetoj laboras bone, kelkaj malprosperas, unuj laboras laŭ plano, aliaj cirkonstancoj. Sendube estas grava nia vigla agado kaj al ĝi helpas plano. Laŭ plano oni pli facile agas. Ne forgesu tial ĉiam fiksi planon! Jen rigardu jarplanon de Esperanta Rondeto en Plzeň:

Aranĝi 10 kursojn por komencantoj kaj 10 por progresintoj, 5 kulturpolitikajn prelegojn, 5 prelegojn pri pacdefendo, 3 kulturajn amuzajn vesperojn, 2 ekspoziciojn, 1 Esperanto-seminaron, 5 ekskursojn, fondi junularkantistan horon, sendi 1000 informleterojn eksterlanden kaj 1 dancamuzon.

LA VERDA MONDO



CENTRO DE ESPLOROJ KAJ DOKUMENTADO EN UEA.

Tiu centro – CED – ekfunkciis la 1-an de januaro 1952. Gvidas ĝin D-ro Ivo Lapenna. Tasko de CED estas tre grava, ĉar estas bezone efektive koni nian movadon kaj agadon de Esperantistaro. Jen el cirkulero de CED:

- a/ Pro manko aŭ tro malfacila havegeblo de novaj sociologiaj kaj lingvistikaj studoj, la institucioj, okupiĝantaj pri la disvastigo de la lingvo, estas devigataj uzi ofte maltaŭgajn aŭ tre malnoviĝintajn argumentojn, kiuj povas esti tre malutilaj.
- b/ Multaj elstaraj Esperantistoj troviĝas iom malproksime de la movado kaj agas sendepende. Ilia laboro ne estas sufiĉe vaste utiligata.
- c/ Pri gravegaj punktoj mankas al ni informoj. Ni ekzemple nenion aŭ preskaŭ nenion scias pri la nombro de Esperantistoj, pri la socio konsisto de la movado, pri la kvanta kaj kvalita aspektoj de nia nuntempa literaturo, pri la praktika apliko de la lingvo sur diversaj kampoj, pri la kontribuo de la Esperanto-movado al la paco kaj internacia solidareco. Tio multege malhelpas ĉian ajn seriozan laboron, sed tute speciale ĉe gravaj institucioj, kiaj estas Unesco, sciencaj, universitatoj, foiroj, komercaj ĉambroj k.a. Se ni deziras sukcesigi nian aferon en tiuj medioj, ni devas dokumenti nian starpunkton. -

Kunhelpantoj estas akceptataj: tiuj, kiuj povas kree kontribui al la taskoj de la centro por verkado de studoj kaj disertacioj., per kolektado de informoj, per plenumo de apartaj taskoj / ekz.statistikoj / donataj de la CED, kaj tiuj, kiuj pro sia socia pozicio, persona rilatoj, profesiaj laboroj ktp. povas sukcese helpi la klopodojn de la CED en diversaj medioj / sciencaj, artaj, trafikaj, komercaj, politikaj ktp./ kaj en diversaj landoj.

Apogantoj estas konsiderataj ĉiuj personoj kaj institucioj, kiuj, komprenante la gravecon de la CED, deziras financo kontribui al bona plenumo de ĝiaj taskoj. Ili regule ricevas ĉiujn informojn pri la funkciado kaj la laboro de la CED kaj pri la rezultoj, kiujn ĝi atingas.

En sia pli ol sesdek-jara ekzisto la Esperanto-movado montris almirindan vivkapablon. Ĝin ne detruis la skismo, nek la du grandaj militoj, nek diversaj tiranecaj reĝimoj, nek la kontraŭstaro de gravaj aŭtoritatoj, nek – ni estu sinceraj al ni mem – niaj propraj eraroj. Batita kaj terenĵetita, ĝi ĉiam trovis forton por releviĝi; ignorita, ĝi ĉiam sukcesis denove aŭdigi sian voĉon; forlasita de siaj adeptoj, ĝi ĉiam akiris novajn entuziasmajn batalantojn. Granda ideo kaj nobla idealo, por kiu oni oferadis, por kiu oni suferadis, por kiu oni eĉ mortadis. Sed inter ne perej kaj venki estas diferenco. Kaj ni ne volas nur ne perej. Ni ankaŭ volas venkigi definitive la aferon.

37-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La Kongreso okazos la 2- - 9. de aŭgusto en Oslo, Norvegio. La Kongreson invitas la urbestro de Oslo, la estraro de Norvega Esperantista ligo kaj la estraro de Klubo Esperantista en Oslo.

Kongresejo estas la Universitato de Oslo, situanta meze de la urbo. La oficiala lingvo de la Kongreso estas nur Esperanto.

La kongresa programo konsistas el jenaj ĉefpunktoj: Interkona vespero, solena malfermo, diservoj, Internacia Somera Universitato, kunsido de la kvar sekcioj, ĝenerala kunsido, fakkunsidoj de diversaj internaciaj organizaĵoj, kongresa balo, tuttagaj ekskursoj, oficiala fotografiĝo, arta kaj varietea vesperoj, belartaj konkursoj, ekskursoj en kaj ĉirkaŭ Oslo, solena fermo k.a.

ZAMENHOF / MONUMENTO EN WÖRGL – TIROLO

Starigon de la monumento iniciatis samideano Hans Steiner sindona laboranto kaj el monanto de „Informletero“. Jam en la 7-a numero de EV ni publikigis raporton pri lia plano.

La preparlaboroj iras laŭplane. Alvenis grandaj kaj multaj mondonacoj kaj al Kom. kons. Martin Pichler, urbestro de Wörgl, Aŭstrio alvenis amaso da dankskribaĵoj el ĉiuj landoj.

La inaŭguro okazos la 27.7.1952. La inaŭgura festo promesas fariĝi solenega. Protektoraton transprenis aŭstria kanceliero Dro Figl kaj li persone senvualigos la monumenton. Multaj ŝtataj kaj ekleziaj eminentuloj de Aŭstrio kaj eksterlando estas en la honora komitato de la Zamenhof-Monument-Komitato.

Ni deziras al niaj kunbatalantoj en Tirolo kiel eble plej grandan sukceson kaj ĉe publiko konvinkantan influon.

ESPERANTISTA URBESTRO

La nova urbestro de Vieno, Franz Jonas, estas Esperantisto eksprezidanto de la Aŭstria Laborista Esperanto-Asocio.

GERMANIO

Okaze de Industria ekspozicio en Berlin loka Esperantista Societo prezentis specialan programon per televizo.

En Hamburg 80 policianoj nunjare studas Esperanton en kurso.

FERVOJA ESPERANTA VORTARO

400 fervojistoj-Esperantistoj el diversaj landoj kunvenis en Parizon, kie ili interalie kunmetis la vortaron de fervojaj terminoj.

ESPERANTO KAJ PRINTEMPA FOIRO ĈE LA BRITA PACKOMITATO

La Brita Esperantista Packomitato akceptis proponon de londona packomitato por partopreni Printempan foiron, kies profito estos uzota por la propagando de paco en Britio. Esperantista stando povas fariĝi la plej granda sensacio de la foiro kaj vekti la intereson de ĉiuj vizitontoj, se ankaŭ eksterlandaj Esperantistoj kontribuos al ĝia abundeco kaj intereseo.

Laŭ „Pacdefendanto“

FINNLANDO

La direkcio de la finnlanda fervojaro eldonis plurlingvan frazaron por la uzo de la konduktoroj. Unu el la 7 lingvoj estas Esperanto. - Siatempe ankaŭ svedaj ŝtatfervojoj eldonis tian frazaron kun Esperanto.

„La Espero“

MEDICINA REVUO

Tia estas la nomo de nova faka revuo, kies unua numero aperis 36-paga. Ĝi estas eldonata en Japanio. Administrejo Tomozi Aosima, Sinmati 123, TIBA, Japanio.

„La Espero“

UNIKA KOOPERATIVO EN BRAZILIO

Entuziasmaj kaj agemaj geesperantistoj en Brazilio fondis Kooperativan Societon kun la celo starigi librovendejon, presejon, Esperantan restoracion kaj konstrui Esperantan domon. Jam alvenis bona fundkapitalo.

„Esperanto“ Hradec Králové

ESPERANTISTA ĴURNALISTO EN BRAZILIO

Dum la 4-a ĵurnalista kongreso okazinta en Racife, Brazilio, la ĵurnalisto Ney Octaviani Bernis proponis, ke sekvente la ekzemplon de ĵurnalista centro de Pernambuco oni instruu la internacian lingvon el ĉiuj brazilaj centroj. La propono estis unuanime aprobata.


Bulteno-Brno

INTERNACIA LINGVO SERĈATA POR AVIADO

En konferenco de la komunikada sekcio de ICAO / Internacia Civila Aviada Organizaĵo / en Montreal, Kanado, oni rekomendis al ĉiu ŝtato, ke oni starigu esploradon pri la redaktado de aviada internacia lingvo surbaze de la angla.



Estas tre dezirinda, ke ĉiu Esperantisto skribu al la sekretario de sekcio ILA, ICAO, Montreal, atentigante pri la ekzisto kaj disvasteco de nia lingvo.

Bulteno de Argentina Esperantisto 263



ARGENTINO


Esperanto-klubo en Rosario, Argentino aranĝos rememore la datrevenon de la naskiĝo de Esperanto / la 25-an de julio 1887 / en julio 1952 grandan letervesperon. Sendu amase leterojn, postkartojn kaj ĉiuspeciajn propagandaĵojn. Ni rekompencos vin per tre bela poŝtkarto kaj bela koverto. Ne prete skribu hodiaŭ por helpi nian movadon en Argentino. La adreso: Rosaria Esperanto-Klubo, San Lorenzo 1053, Rosario, Argentino.



NI ELKORE DANKAS al niaj subtenantoj:

Junularo Chrudim / Věra Zaňková /; Esp.-Rondeto Pardubice / Karel Franc ; Olga Závorková, Most; M.Novák – Praha; Junularo rýchnov n/Kněžnou, / Z.Zemanová/; Fr.Hába kaj Al.Rychlík – Vizovice; Junularo Praha / VI.Vyhlídka /; Karel Kraft Rosovice ĉe Dobříš; Esp.-Rondeto Dobříš; Soňa Zedníková – Praha-Modřany: Olda Kaláb, Karviná; Frant.Svačina – Lanžhot; Esperanto-Servo České Budějovice Junularo Chrastava u Liberce / Lad.Mlejnek / Lubomír Horák- Brno; Fr. Jandauš – Valašské Meziříčí.

Ni klopodas rekompenci vian afablecon per bona cirkulero.



Esperanta kanto

La fluanta tajdo

Orig. De Harison Hill

Muziko: G.F.Root

1. Jen la kanto de kuraĝ
por maristo en vojaĝ
ĉar kuraĝon ĉiam donas melodi'.
Do kunkantu maristar,
vi la rajton havas, ĉar
la fluanta tajdo estas nun ĉe ni.

Ref.: Trinku, trinku kamaradoj! Gloran estontecon havas vi:

Estas bela la ĉiel', ĉiam brilas nia stel'
la fluanta tajdo estas nun ĉe ni.

2. Kontraŭ vento, kontra ond'
kunbatalis nia rond;
post la nuboj ofte kaŝis sin la stel'.
Sed la tajdo venas nun,
sin prezentas oportun,
kaj la stelo klare bliras el ĉiel'.

Ref.: Trinku, trinku kamaradoj!

3. Do altiĝu nun la kor';

la ventegoj pasis for
kaj la bordon preskaŭ vidi povas vi.
Helpa vanto blovas nun,
kaj ekbrilas varma sun';
la fluanta tajdo estas nun ĉe ni.

Ref.: Kantu, kantu kamaradoj ktp.

4. Levu velojn al ventet',
levu voĉojn al kantet,
levu korojn al ĉiama la esper'!
Kaj altiĝu la kuraĝ',
ĉar la fino de vojaĝ
estas nepre la triumfo de l' Afer'.

Ref.: Kantu, kantu kamaradoj




Orig. de Harison Hill Muziko: G.F.Root

Marŝe

Jen la kanto de kuraĝ por maristo en vojaĝ ĉar kuraĝon ĉiam donas melodi'. Do kunkantu maristar, vi la rajton havas, ĉar la fluanta tajdo estas nun ĉe ni.

Trinku, trinku kamaradoj! Gloran estontecon havas vi: Estas hela la ĉiel', ĉiam brilas nia stel' la fluanta tajdo estas nun ĉe ni.



GRAVA ATENTIGO

Ĉeĥoslovakaj gek-doj, petu viajn eksterlandajn korespondantojn, ke ili sendu esperantligvan petskribon al: Společnost pro obnovu Lidic, Vítkova 10, Praha 10, Ĉeĥoslovakio, / Komitato por renovigo de vilaĝo Lidice /, ke ĝi eldonu okaze de la 10-jara datreveno de kruela detruo de la vilaĝo Lidice je ordono de germanaj faŝistoj, libron aŭ broŝuron en Esperanto pri tiu mondkonata faŝista kruelaĵo kontraŭ senkulpaj civitanoj. Al la supra adreso ankaŭ vi mem sendu amase nacilingvajn petskribojn. Niaj kamaradoj en la ĉefurbo jam kontaktas kun tiu komitato kaj estas la espero, ke nia propono estos akceptota, se ankoraŭ vi ĝin bona apogos.

J.Roiser en „Pacdefendanto“

SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO EN DOKSY / 26.7. - 9.8.1952 /

Ĉi jare jam la sepan fojon fariĝos Doksy ĉe lago de Mácha kunvenejo de multaj gesamideanoj, kiuj volas lerni Esperanton kaj refreŝiĝi.

Aranĝontaj kursoj: elementa, progresinta, konversacia, oratora, por instruistoj laŭ ĉe-metodo. Plu okazos Esperanta seminario pri problemoj de Esperanta gramatiko, literaturo kaj la movado kaj ankaŭ ciklo de literaturaj prelegoj.

Pli detalaj sciigoj estos en speciala prospekto, kiu aperos la 1-an de majo.

TATRA ESPERANTA SOMERO 1952

Somera Kolegio de Esperanto en Doksy intencas aranĝi post la 10-a de aŭsto 10-14 tagan „Tatran Esperantan Someron“ en Poprad sub Tatroj. Antaŭtagmeze kaj posttagmeze okazus okskursoj al Tatroj kaj vespere prelegoj pri esperantologio, literaturo, retoriko kaj pri la instruado laŭ ĉe-metodo.

Pli detalaj sciigoj en prospekto L.K.E.D., kiu aperos la 1-an de majo.

⇒ LA LINGVO ⇐



LA LINGVO

POUŽÍVEJTE SPRÁVNĚ 4.PÁD

1. Jako v češtině po přechodných slovesech.
Mám knihu – Mi havas libron. Vidím tě – Mi vidas vi.
V neděli navštívím bratr – Dimanĉe mi vizitos fraton.
2. Při udání směru / Na otázku Kam? - Kien? /
Do divadla - En teatron. Tam - tie / Mi estis tie /
Jíti daleko - Iri malproksimen. Tam - tien / Mi iras tien /
3. Při udání času / Vždy na otázku Jak dlouho? nebo Kdy?
Náš kurs trval 3 měsíce - Nia kurso daŭris 3 monatojn.
Zůstanu tam aspoň týden - Nia restos tie almenaŭ semajnon.
Schůze se konala 2.března – Kunveno okazis la 2-an de marto.
4. Při udání míry
Provaz je dlouhý 5 metrů - Ŝnuro estas longa 5 metrojn.
Karel váží 76 kilogramů - Karlo pezas 76 kilogramojn.
Věž je vysoká 35 metrů - Turo estas alta 35 metrojn.

J.W.

! NAŠI ČLENOVÉ !!!!!	!	Novaj ESP. GLUMARKOJ	!	„EL POPOLA	
ĈINIO“ !					
! Zaplatili jste již	!	PRIPACAJ – folio kun	!	vi povas mendi ĉe	!
! všichni členské	!	50 pec.kostas 10,- Kčs	!	s-ano R. Burda	!
! příspěvky 1952 ???	!	Mendu en librovendejo	!	Palackého nám. 6,	!
! Esperanto Lanškroun	!	de EAĈSR.	!	PLZEŇ – ĈSR.	!

IV. LETNÍ KURSY ESPERANTA V ROŽNOVĚ POD RADHOŠTĚM

Svaz esperantistů ĈSR, kraj Ostrava, pod záštitou MNV v Rožnově p/R. a spolupráce Ostrava-JUNULARO uskuteční letos opět v klimatických lázních Rožnově p/R. letní esperantské kursy. Všichni zájemci starší 14 let, rezervujte si dovolenou na dobu od 12. - 26. července t.r. a prožijte ji s námi v esperantském prostředí.

Můžete se přihlásit do těchto kursů:

- A. pro začátečníky
- B. pro pokročilé
- C. přípravný kurs pro kandidáty na učitele esperanta.

Dopoledne vyučování, odpoledne koupání, výlety do krásného okolí Beskyd. O bohatý večerní program je postaráno.

Platební podmínky budou asi stejné jako loňského roku. Bližší zprávy se dovíte v některém z příštích oběžníků.

Informace a přihlášky zasílejte na adresu:

Marie Skařupová
pošt.příhrádka Ostrava 10,
Vítkovické železářny.

SPOLUPRACUJTE S NÁMI !

Oběžník nevydáváme jen pro naše potěšení, ale pro Vás, Vaši činnost, aby jste si byli vědomi, že všude pracují, u nás i za hranicemi, staří i mladí a hlavně mladí, kteří naše hnutí ožívují a jednají s opravdovým optimismem. Tento oběžník je naším pojítkem a také pomocníkem. A aby svou funkci plnil dobře, musíme se všichni přičinit o dobrou úroveň jeho obsahu. Posílejte nám různé články, básně, písně, krátké zprávy z hnutí ... Posíláte-li překlady, uveďte autora a název knihy nebo časopisu, z něhož překlad pochází. Staňte se našimi dopisovateli. Redakce

!		!
!	Cirkulero ESPERANTA VORTO aperas laŭbezone. Eldonas ĝin kaj senpage dissendas	!
!	Esperanta-Junularo, Palackého 729, Lanškroun.	!
!	REDAKCIO: Jan Werner, Gottwaldova 65, LANŠKROUN, Ĉeĥoslovakio.	!
